



EKO 2015/17 eksendita el Budapeŝto la 5an de majo 2015

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, la gazetaro, regionaj komisionoj, listoj kaj unuopuloj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Financoj kaj Kongresoj lastatage

Sube ni resumas la diskutojn en la estrarkunsido de UEA plejparte el la fino de vendredo la 24a de aprilo kaj dimanĉo la 26a de aprilo. Por la kongresaj temoj partoprenis Julia Hedoux (JH) kaj Xavier Dewidehem (XD) de LKK Lillo, Petro Balaž, Jozef Reinwart kaj Ján Vajs de LKK Nitra, KKS Clay Megalhães (CM) kaj Ĝenerala Direktoro Osmo Buller (OB).

7. Financo kaj planado

La diskutoj centriĝas al la financaj implicoj ĉe salajroj pro la transigo al nova Ĝenerala Direktoro. Poste, la meĥanismo por akceptigi ĉe la Komitato buĝetan deficiton (i.a. por permesi Movadan Evoluigon). Sekvis klarigoj pri la traktomaniero de valorpaperoj, la librotenado de la valoro de la domo kaj pri unuopaj spezoj en buĝeto 2016. Oni demandas la netan enspezon pro UK. La alteco ĉe Nitra (pli ol en buĝeto Lillo) pravigeblos en Lillo, ĉar ni povos montri, ke la enspezo de la jubilea kongreso superis la buĝeton 2015. Tuŝitaj temoj pri rentoj kaj la profesia konsilado pri merkataj prognozaj. La kapitalo restas stabila tra pluraj jaroj.

Buĝeto 2016

Neces fari retan voĉdonigon de la Komitato por retiri la siatempan decidon malakcepti deficitajn buĝetojn. Ĝi devos esti bone motivita, kaj prefere ne temu pri la unua reta voĉdono – tiu havu malpli esencan temon kaj servu kiel provo de la sistemo.

Kongresoj

Rilatoj estraro, LKK kaj CO

Kompetentecoj: kiu decidas, kiu gvidas, kiu iniciatas (Roloj de Osmo kaj kongresaj oficistoj). OB respondas, ke CO devas ricevi informon pri ĉiu propono kun financaj implicoj. Praktika gvidilo utilis, aldone al la preskriboj de la Kongresa Regularo.

Buĝeto: Ambaŭ LKKoj forte pledas ricevi multe pli frue orientadan buĝeton, por povi respondi al petantoj, havi ideon pri la skalo de la ebloj, kaj havi dokumentojn por prezenti al oficialaj instancoj, ekz. por ricevi subtenon. OB kaj CM emfazas la malfacilaĵojn pretigi fruajn buĝetojn. JH pledas por pli da buĝeta detalo, ekz. por ekskursoj aperas nur neta sumo; dezirindas la sumaj enspezoj kaj la sumaj elspezoj. Ŝi volus havi regule ĝisdatigatan raportadon pri la evoluo, ekzemple de ricevitaj enspezoj kaj enkontigitaj kostoj, por ke oni sciu kiam da restanta mono estas uzebla.

Regulaj skajpaj kunsidoj okazu kun KKS, ekzemple, en ĉiu dua semajno.

Uzado de komuna laborspaco: ekz. google-docs – tion uzas la Lilla LKK; ili rekomendas al CO uzi tion. Proceduroj sistemigendaj, utilis disponi pri ŝablonoj, skemoj, Gvidilo pri organizado de UK : Decidite, ke ambaŭ LKK notu en iu komuna laborspaco ĉiajn demandojn, pri kiuj dezirindus atento en gvidilo. Poste UEA nomumu redaktanton por tiu gvidilo.

UK 2016: Nitra (Slovaka skipo prezentas)



Kongresa triopo: meze la respondeca estrarano Barbara Pietrzak, maldekstre la sukcesa proponinto de UK 2017, estrarano Lee Jungkee, dekstre slovaka LKK-ano Ján Vajs por UK 2016 en Nitra. Foto: SMG

Gazetaro: Kvar gazetaraj konferencoj okazos tra 2015 kun la urbo: majo, aŭguste kaj plie

Gastoj en Lillo: Povos veni oficuloj el Nitra al Lillo por lastaj du tagoj ('Sekva UK prezentas' kaj Fermo); ili estos gastoj, 3-5 homoj akcepteblos. Slovaka muzikgrupo infana estas proponata; kiuj varbu por Nitra. Ili senpage povas eniri (infanoj ĉiukaze senpage UKumas).

Retejo: Dezirindas kongresa reta kolektejo ĉe UEA, por ke ĉiu UK ne devu nepre fondi propran, krome tio konservas informojn por iama esplorado.

Trejnado: LKK kunsidas regule, planatas trejna semajnfino, al unu el tiuj venu CM.

Q-kodoj sur konstruaĵoj vidigos en poŝtelefonoj klarigojn en multaj lingvoj pere de Vikipedio, i.a. Esperanto. Sponsorado estas esplorata. LKK proponas ‘malferman tagon’ en la lasta vendredo, kun programeroj en la slovaka por la publiiko, inter ili rapidkurso. Urboplaca koncerto, eventuale aliformita Internacia Arta Vespero. CM proponas tamen la merkredon, kiam ne estos vespera programo en UK.

Gastoj: Multaj diskutoj pri eksteraj rilatoj kaj gastoj, precipe en la lastaj du tagoj. MS: Okazigu publikan lingvokurson antaŭ UK.

IJK okazos en veterinara centro, do ĉeestos bestoj, loko kun 200 dormlokoj, tiom proksime al Nitra, ke gepatroj povos loĝi surloke – samĉambre kun infanoj aŭ en alia etaĝo. Urba trafiko atingas la lokon. UEA devas nomumi novan komisiiton.

Unu antaŭkongreso en Ĉeĥio (bazo Svitavy), du postkongresoj – Budapeŝto / Tatroj aŭ rondiro (Budapeŝto / Vieno / Prago).

Vizoj kaj invitoj: CM klarigas la kutiman politikon pri vizoj. Demandoj: kiuj faras invitojn al gravuloj? Kutime CO, sed iru slovaklingva versio kaze de Nitra.

Pri kotiztabelo: komitata laborgrupo esploros eblon de C-landoj, por UK kaj UEA-membreco. SMG: ‘Universalira Kongreso’ por B-landanoj el la regiono (HU, RO, BG, SR, HR, PL, CZ...).

UK 2015 : Lillo

Prezento de la ĝisnuna laboro de LKK

Akcepto kaj volontuloj:

Buĝeto €4100 por fari repagojn ne sufiĉos. Repagoj spegulos la kvanton da laboro. LKK volus buĝeton de €9000; ne nepre foruzotan, se homoj redonacas la sumon. Urbaj subvencioj petitaj, nedeciditaj. Parto de la ekskursita buĝeto povus kovri la kostojn de ĉiĉeronoj.

Komunikado alekstera:

Tio okazos ĉefe antaŭ la UK kaj pri la ceremonioj en Boulogne (ties urbodomo volos okazigi gaz. konf. en tiuj tagoj.) MF alvenos merkrede, indos gazetara konferenco en ekzemple ĵaŭdo.



Komunikado interna:

Dezirindas pli forta kunordigo de gazetaraj komunikoj de UEA kaj LKK, kaj eroj en Facebook.

SMG pretas plusendi ricevatajn tekstetojn al LA, FA ktp per EKO-komuniko – ĉ. mil adresoj kun plusendoj.

SMG dum la UK kreos laŭeble ĉiutagajn komunikojn en la serio EKO, kunlabore kun la redaktoro de la kongresa kuriero, Stano Marĉek.

Programo

Fondinda ejo ĉe *Google Drive* por konstrui eĉ provizorajn versiojn de la programo, kiun LKK kaj CO kaj la estraro povos enrigardi. MF : Okazos komitataj forumoj tagfine laŭ la skemo de Bonaero, sed la sorto de la matenaj seminarioj estas malpli certa.

Bankedo

CM prezentas la nunan staton, okazis konkurso inter du proponoj. Unu el la proponoj jam aperis en la Dua Bulteno, decidite resti ĉe tio. CM informos al la respondeculo en LKK pri tio.

Inaŭguro

LKK proponas modifojn por agrabligi la sesion al la ne-espistaj honoraj gastoj. Paro da 'animistoj', kiuj gvidu la programon pli spektaklece. MF plus kongreslandano, eble. Diskutinde. Alia meblumado? Lillo havos enorman podion, flekseble uzeblan. Apartaj animistoj por la Landaj Salutoj? Projekciado de mondmapo kun landoj laŭvice indikataj aŭ io simila? Aŭdigi iam naskiĝtagan kanton pro la jubileo?

Spektakla programo

CO ne kutimas subskribi kontraktojn kun artistoj. JH trovas kontraktojn utilaj kaj gravaj, kaj jam pretigis multajn. CM aŭ OB subskribos kontraktojn, kiujn pretigis Flo Martorell post unu semajno.

Kultura programo: franca parto kaj alia parto

Francaj prelegoj pri kantoj, vinoj. Nesukcesintaj IKU-proponoj ne temas pri franca kulturo. Kiel kutime 'Franca eksprese' : estu du prezentantoj, por oferti du ĉiutage tra kelkaj tagoj. Estas dek proponoj pri ekspozicioj. Kiu prizorgas ? Pri serio Okcidento-Oriento, pri ĝemelaj urboj... En apuda kulturdomo povos esti ekspozicioj ĝis ĵaŭdo – vendrede bezonata por KER-ekzamenoj. Povus esti, ke iuj ekspozicioj povos aperi nur dum du/tri tagoj, poste lasi la lokon al alia? CO ne povas prizorgi ekspozician enhavon.

Junulara programo (TEJO, JEFO...)

Ne konkretiĝas. TEJO petita agi – malfacilas scii, kiuj aliĝintoj al UK estas sub 30-jaraj. CO devus liveri tion.

Ekstra programo: infanoj, futbalo, konferencoj...

Estos infan-vartejo. Futbalo kaj stadiono necertaj. Sponsoroj devas respondi. Monhelpo de UEA? Brazila asocio pretas monhelpi.

Ceremonioj: Bulonjo, Lille, Inaŭguro Waringhien

Necesos fiksi, kiom da estraranoj ks. bezonatos en Boulogne-sur-Mer, kaj kiel financi tion. LKK petis 300 lokojn en urbestra akcepto, sed ne venis respondo. Inaŭguro de domŝildo ĉe la naskiĝdomo de Waringhien, UEA prizorgu invitojn, kiuj inkluzivu la prezidanton de la Akademio (Kiselman), kiu parolas flue la francan. Duonhora ceremonio, kun iu deklamaĵo el la verkoj de GW. LKK petos haltigi trafikon en la koncerna placo.

Retkongreso

Homoj de la Kongresa Temo volus, ke iuj tiuj programeroj disiru rete, kune kun ia eblo por interagado. Necesas trovi realigistojn. JM pretas prizorgi retradion fine de ĉiu tago. La estraro difinu, kiuj eroj ricevu rektan disendon. Teknikaj ebloj ekzistas, sed necertas sufiĉaj helpantoj. Cyrille Hurstel volas okupiĝi, sed bezonos teamon.



UK: 2017

CM prezentas komparon Seulo-Montrealo. Ambaŭ kandidatoj liveris dokumentojn. Diskuto kiel atingi la nombron da hotelmendoj ĉe la kongreseja hotelo en Montrealo, tiel ke la kongresaj salonoj estu senpagaj. LJK klarigas la kongresejan luprezon, altigitan pro kurzoŝanĝoj kaj kostoj de teknikaĵoj. La korea prezo inkluzivas teknikaĵojn, instalitaj ĉiusalone.

En Kanado eblos reakiri impostojn je kongresaj kostoj. (15%). Oni pripensas la movadajn argumentojn por ambaŭ proponoj, kun atendeblaj partoprennombroj. Montrealo, maks. 1200, pli verŝajne 1000. Por Seulo, LJK atendas 2000 – milon el CN, 300 JP, 500 KR. LKK aktive varbos. La estraro voĉdonas, deklarinte, ke la du proponoj bonegas kaj malfacilas decidi (pli ol hora diskuto). La rezulto favoris Seulon per kvin voĉoj. Pri anoncado, MF samnokte informis la kandidatojn kaj neĉeestintajn estraranojn. Montrealo reproponu sin por la sekva ekstereŭropa UK. Se OB povos pretigi iam sabate la Gazetaran Komunikon (GK), ni povos en la Malferma Tago en 'La Estraro Respondas' anonci la decidon. (GK *foriris frue sabatmatene, konigo en la Malferma Tago okazis jam matene, reage al demando*). EKO 15 konigis la informon nur post forsendo de GK (SMG: *longe post* ☺).

Oni poste proponas datojn 22-29 julio (la kutimaj). Verŝajne en ordo, sed CM plie esploros, cele al baldaŭa decido.

UK: 2018

OB pledas por almenaŭ unu eŭropa UK post Seulo. Konsentite. Du proponoj ekzistas. Kandidatoj jam estas Finnlando kaj Bosnio-Hercegovino (Lahti kaj Sarajevo), kaj povos veni pliaj.

La kunsido finiĝis je ĉ. 14.00h en dimanĉo. Protokolis kaj raportis: SMG